


PAIVA NETTO

**DIO
ESTAS
SCIENCO**

Dio estas Scienco



João Preda

José de Paiva Netto, ĵurnalisto, radikro-
nikisto, verkisto, komponisto kaj poeto.
Li estas direktoro-prezidanto de Legio
de Bona Volo (LBV). Eminentia lernanto
de Kolegio Petro la Dua, li estas aktiva
membro de Brazila Asocio de Amasko-
munikiloj (ABI), de Internacia, Brazila
Asocio de Amaskomunikiloj (ABI Inter),
de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fe-
naj), de International Federation of Jour-
nalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj
Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro,
de Sindikato de Radiokomunikantoj de
Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵaneiro kaj
de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Kio venas el Dio estas Scienco. Antaŭ iom da
tempo, ni komentis, ke ĉiuj branĉoj de univer-
sala scio konsistigas Dian Sciencon. Ni vidos
en alia okazo, ke Religio estas Scienco, Scienco
estas Religio, ĉar ambaŭ devas obei la moralan
sciencon, kiu plej alte respektas la homojn kaj ne
konsideras ilin iloj por fanatikeco, nek simplaj
kobajoj. La tre sekteca pensmaniero, kiu ankoraŭ
malfeliĉigas multajn homojn, subtenas malamon,
kiu metas en ombron la okulojn de la animo per
geniaj rezonaĵoj, kiuj tamen multon povus fari por
la popoloj soifantaj je mondo pli bona, kiun ili tiel
multe bezonas. Nepre necesas forigi la tabuon, ke
religia fido estas nur por stultuloj kaj por radika-
luloj, kaj ke sciencon akceptas nur tiuj, kiuj havas
akran inteligentecon, tiel ke ili prefere restu for

de sento liganta racion al senmorta Spirito. Indas
substreki, ke troa racio, sen apogo de koro, starigas
ekzemple ekonomikajn solvojn, kiuj privilegias
unuajn kaj detruas aliajn.

En la verko *Dialektiko de Bona Volo*, en 1987,
ni skribis: Multe da absurdaĵoj, listigitaj en la
Historio kvazaŭ ties aŭtoro estus la Kreanto de
la Universo, estas nenio alia ol projekcioj de ia
homforma dio, kiun la homo kreis por kontentigi
siajn gajnojn. Ili estas do la homaj difektoj mem,
altigitaj al stato de diaĵoj.



Photos.com

Surtera vivo implicas konstantan renovigadon. La fluado de faktoj por iuj homoj estas timiga, sed al modestuloj – fronte al la Supera Spirita Mondo aŭ fronte al senlima Solidareco – ili perfekte kongruos.

Vera veraĵo

Se oni pensas pri la urĝa rolo de Scienco je la eksplikado de nia senkorpa vivo, necesas kompreni, ke dum iuj esplorantoj neas realaĵon surbaze de antaŭscioj, kiujn ili juĝas nerefuteblaj, iliaj vidpunktoj, eble antaŭtempaj, povas fariĝi ia neŝanĝebla veraĵo por tiuj, kiuj akceptis ilian aserton kiel lastan instancon, kio kaŭzas terurajn malhelpojn al progreso, ĝis la Scienco mem, apogita sur novaj fundamentoj, ilin malkonfirmos. Evidente, ne ĝi sin kontraŭdiras, sed iuj ĝiaj kulturantoj, eĉ se ĉi tiuj estas tre alte taksataj laŭ la opinio de la kolegoj. Unu fojon, dum prelego, je la 29a-10-2005, ni asertis, ke Scienco estas neerarema, sed ne la sciencistoj.

Li ne estis freneza

Mi ekzemple montras la revolucionan koncepton de la brita saĝulo **Sir Gilbert Thomas Walker** (1868-1958), per lia “Suda Inklino” aŭ “Kurioza Baskulo”. Lia eltrovaĵo ŝanĝis la komprenon pri la efikoj de *El Niño* sur la Tero. Malgraŭ tio, liaj samtempuloj tuj rifuzis ĝin. Tamen, nuntempe, laŭ d-ro **Matt Huddleston**, el Centro Hadley, Departemento de Meteologio de Britujo, “*plej mirinda fakto rilate la eseon de Gilbert Walker estas tio, ke li estis unu el la unuaj homoj, sur la kampo de meteologio, kiuj pensis vaste, kiuj kunligis la veterkondiĉojn je malsamaj kontinentoj. (...) Liajn grandiozajn ideojn oni siatempe kritikis, ĉar homoj ne komprenis, ke vetero kaj klimato en unu regiono eble ligiĝas al alia regiono sur la tergloba. Kaj efektive tio malhelpis lin*”.

Gilbert suferis multajn ironiaĵojn flanke de siaj kolegoj. Poste, tamen, oni konfirmis, ke li estas ĝusta. Walker tute ne estis freneza. La aliaj ja estis senatentaj.

Nu, kiu decidas, ĉu iu veraĵo estas vera? (*ri-doĵ*). Ĉu esplorantoj, kiuj morgaŭ ŝanĝos siajn konceptojn antaŭe konsideratajn de ili kiel ŝtonajn veraĵojn, aŭ modesteco postulata de saĝeco? Kiam erudicion efektive akompanas vasta sperto kaj humila sinteno fronte al la vero, tiam ĝi neniam trorapidas, ne akceptas radikalajn agojn, kaj ne sugestas, ke scienco atingis la honoran kulminon de sia misio, kaj oni krome konsideru la fakton, ke la Homo ankoraŭ ne sukcesis uzi signifoplenan parton de sia mensa kapablo. Insulo ne povas taksi la tutan amplekson de kontinento.

Nepre necesas forigi la tabuon,
ke religia fido estas nur por
stultuloj kaj por radikaluloj, kaj
ke sciencan akceptas nur tiuj,
kiuj havas akran inteligentecon,
tiel ke ili prefere restu for de
sento liganta racion al senmorta
Spirito. Indas substreki, ke
troa racio, sen apogo de koro,
starigas ekzemple ekonomikajn
solvojn, kiuj privilegias unujn
kaj detruas aliajn.

HELPU VI LBV-on AMPLEKSIGI ĜIAN AGADON!

Donu monhelpojn per unu el la jenaj bankoj:

HSBC — Bankokodo: 0343 - Kontnumero: 63275-24

SANTANDER — Bankokodo: 0239 - Kontnumero: 13002754-6



LEGIO DE BONA VOLO

www.bonavolo.com

Centra Sidejo

Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP
Brazilo • CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500

Argentino: Av. Boedo, 1942 • Boedo • Buenos Aires
CP C1239AAW • Tel.: (+5411) 4925-5000 • **Bolivio:**

Calle Asunta Bozo, 520 • Zona Alto Obrajes (sector
A) • Casilla de Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 •

Usono: 20 Calumet Street, 1st floor • Newark/NJ •
Zip Code 07105 • Tel.: (+1973) 344-5338 • **Paragvajo:**

Calle Curupayty, 1452 c/ Mayor Bullo • Cerro Corá
• Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/03 •

Porto/Portugaliao : Rua Alexandre Herculano, 355 •
Freguesia da Sé • CP 4000-055 • Tel.: (+35122) 208-6494

• **Coimbra/Portugaliao:** Rua do Arnado, 3 • CP 3000-
060 • Tel.: (+35123) 983-8133 • **Lisboa/Portugaliao:**

Rua D. Antonio Caetano de Sousa, 15 • D. Benfica •
CP 1500-222 • Tel.: (+35121) 715-4890 **Urugvajo:** Av.

Agraciada, 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800
• Tel.: (+5982) 924-2790

Templo de Bona Volo

SGAS 915 • Lotes 75/76 • Brasília/DF • Brazilo
CEP 70390-150 • Tel.: (+5561) 3245-1070

www.tbv.com.br • www.boavontade.com

www.paivanetto.com.br

Versão em esperanto do folheto "Deus é Ciência"